

BULTENO



de GERMANA ESPERANTA FERVOJISTA ASOCIO

Mitteilungsblatt der Vereinigung deutscher
Eisenbahner-Esperantisten im Bundesbahn-Sozialwerk

Fondita 1952

Numero 3

Junio / Julio / Aŭgusto



33a IFEF-Kongreso en Regensburg

15a ĝis 21a de Majo 1981



13 landoj — unu lingvo

de maldekstre: Svisio, Hungario, Germanio, Italio, Svedio, Norvegio, Nederlando,
Hungario (pionirfervojo), Danio, Bulgario, estro Regensburg ĉefstacio, Aŭstrio, Belgio,
Finnlando, Bulgario, Jugoslavio

Fakorganiza kulmino kaj Muzikfestivalo

IFEF kongresis en Regensburg

515 el 18 landoj aliĝis al la 33-a Internacia Fervoja Kongreso, dum kiu krom la fakspecifa laboro ankaŭ la kulturaj programoj havis speciale altan rangon. Ĝuste en la centro de tiu ĉi mezepokstila komerca urbo nia federacio ne pretervideble reprezentis ekzemplondonan eŭropan etoson.

Lindau — Fulda — Regensburg

Kronikiston de IFEF-kongresoj logas kompari tiujn ĉi germanajn en 1952, 1967, 1981: ĉu la 33a estis la superlativa? Certe laŭ grandeco, certe laŭ amplekso de la programoferto, certe ankaŭ laŭ ĉie rimarkebla sperto de organizantoj. Sed, oni ja povas kun iom da nostalgia bedaŭro konstati: ĉiu pli frua kongreso superis la sekvajn per sia spontaneco, entuziasmo, juneca impeto, kaj ĉiu posta antaŭis la pasintajn per iom pli da perfekteco, oficialeco, glata rutino. Tra tiaj malsamaj okulvitroj oni devas ankaŭ rigardi la efikecon en la ŝanĝiĝanta socio, ĉu en la publika opinio, ĉu en la fervoja medio. Maleblis ĉeesti aŭ eĉ partopreni ĉiun eron de la program-paledo. Precipe laborkunsidoj tiel dense okupis la spacon inter pli leĝeraj aranĝoj, ke necesis selekti kaj rezigni. Verŝajne pro tio al la publikaj plenkunsidoj mankas la pli fruaj vigleco, pipro kaj diskutemo. Probable same tial intereso pri la literatura konkurso ne estis dezirinde vasta. Turisma kadroprogramo devas esti, sed eble malpli multo estus pli adekvata.

Rutine sed grave

Malpli la konataj laŭdoj ol rango kaj graveco de la kongresgastoj, kiuj parolas ilin, signas la reputacion de nia organizajo. Tiel vidite la solena malfermo estis edifa horo kaj samtempe praktika demonstrado, kiel facile, flue kaj racie povas funkcii internacia konferenco. Ĉiu oficialulo parolis la Internacian Lingvon; traduko resuma okazis nur al germana.

Flanke de GEFA kaj LKK prezidanto Gießner esprimis la ĝojon pri gastigado de tiom da en- kaj eksterlandaj gastoj, kio donis la forton organizi tian kongreson. D-ro Emile Schlessler, prezidanto de FISAIC, konfesis, ke jam antaŭ 14 jaroj en Fulda infektis lin la entuziasmo por tiu ĉi lingvo. Direkcia prezidanton de

BD Nürnberg, dipl. inĝ. Horst Weigelt, aparte impresis, ke li per tiu unu sola lingvo povas kompreni sin al 500 fervojistoj el tuta Eŭropo. Ĉefurbestro Friedrich Viehbacher prave opiniis la historian fonon de Regensburg speciale taŭga por tia internacia kongreso. Sekci-prezidanto Friedrich Knop salutis nome de la BSW-ĉefestraro, citante biblian antaŭbabilan unulingvecon kaj konkludante historie, kiel konkerantoj ĉiam porforte altrudas sian lingvon, kontraŭe la esperantistoj klopodas disvastigi ĝin per konvinkado. „Moroj kaj naciaj lingvoj dividas la popolojn, Esperanto interligas ilin“, vokis Alfred Summer por la BSW-distriktestraro Nürnberg. Ernst Haar, prezidanto de la sindikato GdED ekkonis la signifon de nia lingvo en internaciaj kontaktoj kaj certigis korporacian akceladon kaj subtenon de 436 000 sindikataj membroj. La estro de la sindikato GDBA Ludwig Betzmeir respektoplene konstatas, kiom helpa estas Esperanto tie, kie najbaro najbaron ne komprenas plu.

UEA-prezidanto Grégoire Maertens estis veninta el Bruĝo ne nur por saluti, sed ĉefe por ekkoni tiujn homojn, kiuj esence kontribuas al la movado. Nome de SAT salutis Denise Happi, por GEA ties prezidanto Elsbeth Bormann, por Bavara Esperanto-Ligo Hermann Schmid. Eŭropa Asocio de Fervojistoj (AEC), laŭ ties germana prezidanto Helmut Döpfer, en sia 20-jara ekzisto spertis lingvajn malfacilaĵojn, sed nun de du jaroj aplikas Esperanton kiel interlingvon.

La landajn asociojn de IFEF reprezentis 15 gekolegoj. Fine vicprezidanto Per Engen malfermis la kongreson. Forte aplaŭdita de la tuta kongreso kaj je sincera ĝojo de liaj multnombraj geamikoj kolego J. J. Labordus ricevis el la mano de la FISAIC-prezidanto la arĝentan medalon de tiu federacio. Tio certe estis nur modesta kompenso por pli ol 30-jara aktivado en FERN kaj IFEF kaj ĉio, kion

ni dankas al li, tamen emocia, reprezenta agnosko de liaj meritoj. Gratulon al la honorigito!

Pli rutina, sed ankaŭ grava estas ĉiam la akcepto fare de la urbestro. Antaŭ pli-malpli granda fono publika, gustumante la vinon de la regiono, oni interŝanĝas

donacojn kaj afablajn vortojn, ne mankipova ceremonio por renomita organizaĵo. Tamen ĉi-foje la oficiala akcepto ricevis specialan aspekton per la partopreno de uniformitaj fervojistoj el 13 landoj, kiuj jam paradis dum kaj antaŭ la solena inaŭguro.



Akcepto fare de la ĉefurbestro

Fake kaj lingve

Pri plej lastaj teknikaj evoluoj informis la fakprelego „Trajno sen radoj“ ĝisdate aktuala, verkita, prezentita kaj ilustrita de Gernot Ritterspach, legebla resume en tiu ĉi Bulteno. Ĉi-loke ni ripete akcentis kiel nerefutebla argumento por la Internacia Lingvo estas ĝuste nia faklingva laboro, kies esenco troviĝas en fakliteraturo kaj fakprelegoj. Nur kelkajn semajnojn antaŭ ĉi tiu kongreso aperis en germanlingva fakteknika revuo artikolo pri „La Direttissima“ inter Roma kaj Firenze, prezentita kiel novaĵo, kiu ĝisdetale respegulas nian kongresan fakprelegon de Romo, faritan de d-ro

De Salvo antaŭ tri jaroj. Se oni volas alian pruvon pri aktualeco de niaj fakprelegoj: „Trajno sen radoj“ kompilas informojn, ne jam aperintajn en aliaj lingvoj. Valoras do distribui ĝin kaj publikigi almenaŭ la unupaĝan resumon en nacia lingvo.

Terminara Komisiono diligentege laboris preskaŭ permanente. Ekzistas espero, ke antaŭ eldono de nova UIC-vortaro la tuta komplekso estos prilaborita. En la Fakprelega Komisiono nova iniciato vigligis la kunsidon. Kunlaborantoj el ok landoj kontribuis per raportoj pri fervojaj novaĵoj el sia aŭ alia lando. La Komitato konfirmis la ĝisnunajn estraranojn de ambaŭ komisionoj en iliaj oficoj.

La ĝenerala lingva nivelo rimarkeble ne pliboniĝis. Tion oni konstatis ne nur dum diskutoj kaj ekskursoj, en manĝejoj, vestiblo kaj koridoroj kongresejaj. Ankaŭ Trixini renkontis lingvajn malfacilaĵojn, kiam li el la publiko serĉis kunsorĉantojn por siaj magiaj ludoj. Salutinda tial estas la nove instalita kursprogramo, kiu jam la trian fojon funkciis en IFEF-kongreso. En Regensburg sinjorino Childs-Mee sperte gvidis kaj bazan lingvokurson kaj seminarion pri la rekta instrumentado, el kiu lasta sepdeko da interesitoj povis ĉerpi aplikeblajn sciojn por la propra instrupraktiko. La baza lingvokurso havis nur tian mankon, ke ĝin ne partoprenis tiuj, kiuj plej necese bezonus tian helpon.

Rimarkindaj novaĵoj

La Komitato decidis pri komisiono al Wim van Leeuwen, kiu pretas esplori eblojn, vojojn kaj ŝancojn de fondota informfako. Ne tute nova, sed ĝis tiam praktikita nur en la 19-a Kongreso, estis la uniform-parado, kiu tre efike ankaŭ optike demonstras nian internaciecon. Kongresa poŝtstampo sur speciala koverto trovis plaĉon de ĉiuj pli-malpli seriozaj filatelistoj. Bonege kompilita ekspozicio, ankaŭ kun filatela parto, estus meritinta pli bonan lokon; ĉar iom kaŝita en angulo de la ofte homplena kongreseja vestiblo, ĝi apenaŭ atingis tiun publikon, por kiu ĝi estis farita. Pli varbefika montriĝis informstano en la urbocentro; ĝi vekis atenton kaj kontentigis scivolemon de multaj preterirantoj.

Al unuafoje okazanta literatura konkurso „La Verda Relo“ 41 verkintoj kontribuis pli ol 60 laborojn poeziajn kaj prozajn. Antaŭ la publika honorigo de la premiitoj sinjoro Rößler recitis plurajn elektitajn verkojn.

Trixini faris „kvazaŭ“! En vesperplena programo la „magiisto kun la blua ŝtono“ sprite kaj amuze streĉis la atenton de la kongreso. Sub la kongreseja tegmento funkciis la amatora radiostacio DL O BC. Ĝi dissendis mesaĝon pri la kongreso en tutmondon kaj havis centojn da kontaktoj en ĉiuj kontinentoj.

Same nova estis Jogo-seminaro. Sinjorino Irene Gießner en du lecionoj, unu teoria kaj unu praktika, al 27 interesuloj donis



Trixini prezentis magiajn ludojn

valorajn instigojn. Ankaŭ ideoj pri la ekologia ekvilibro de nia mondo kvazaŭ tra la malantaŭa pordo penetris en la kongreson. Pastoro Burkhardt en la sabata ekumena diservo predikis admonon, ke ni ne ekspluatu nian terglobon ĝis danĝera fino; ĝi estas donita al ni nur prunte.

Solenaj kaj serenaj sonoj

Kredeble neniu kongreso antaŭa estis akompanata de tiom da muziko kaj kantado. Pli multaj kongresanoj ol loko estis rezervitaj aŭskultis dimanĉon la faman knaboŝoron Katedralaj Paseroj Regensburgaj. Solenaj muzikaĵoj ankaŭ edifis la partoprenantojn en la ekumena diservo; tie solkantis Barara Kohl kaj muzikis la trombona orkestro de Heilbronn. Tiu lasta tre diligentis krome je pluraj okazoj: en du plac-koncertoj antaŭ la kongresejo kaj en la ekskursloko Falkenstein, plue por la inaŭgura ceremonio.

En plene okupita preĝejo St. Emmeram la geaŭskultantojn atendis aparta ĝuo: eklezia muziko el mezepoko ĝis nuntempo, de Händel, Bach, Schubert, Mozart, Gounod kaj i. a. en bavara folkloro maniero, kun tekstoj modelstile tradukitaj

de Joachim Gießner. Renomitaj solistoj, Béby Kohl, Anni Wiesmann, Ludwig Fluck, krome la vira ĥoro de la lokomotivejo Plattling kaj du ĉambroorkestroj majstre prezentis tiujn unikajn muzikaĵojn.



La eklezia muzikprezentado en St. Emmeram

Kvarteto de la fervojista orkestro Nürnberg kun Mozart kaj Haydn ankaŭ kadrumis la inaŭguran solenaĵon. Popolmuziko, decatone ludita, ne multe ĝenis la konversaciojn de la interkona vespero.

Posttagmeze per gurdosonoj Trixini venigis la homojn al la informstano en la urbo. Dum la balvespero kaj en la ekskursŝipo sur la Danubo moderritma dancmuziko logis al respektiva movado.

Unu tuta vespero estis dediĉita al „Regensburga Bukedo“, kiu enhavis folklorajn dancojn, muzikon kaj kantojn, parte en dialekto, parte en trafa esperanto-traduko. Dumvoje al la ŝipveturado 370 ekskursanoj atente aŭskultis en la baroka katedralo de Passau koncerton el

la majesta orgeno, la plej granda en la mondo.

Kaj fine ankaŭ la kongresanoj mem gaje uzis la okazon, kanti popol- kaj migrokantojn trovinte en la ekskursautobusoj tekstojn kaj instigan kasedomuzikon. Ĉu ne vere, muzikfestivalo kun solenaj kaj serenaj sonoj? Nur unu kanton oni ne aŭdis: la himnon!

Informado

Kiu deziras plej ekzaktan raporton pri la 33-a IFEF-Kongreso, tiu havigu al si la Kongresan Bultenon, tie distribuitan; ĝi pli detale informas pri la grava evento kaj certe plenigus du GEFA-Bultenojn. Aliaj utilaj servoj de la redakcia teamo estis gazetara informado kaj la ĉiutaga

esperantlingva sciigo pri novaĵoj tut-mondaj, tre bezona ne nur por tiuj kongresanoj, kiuj ne komprenas la lingvon de la gastlando, sed ankaŭ bonvena selekto por multokupitaj kunsidantoj.

Plurajn gazetartikolojn sekvigis la intensa informa laboro kaj radiointervjuo de la sendstacio „Deutsche Welle“. Ĝi disradias ĉefe al ekstereŭropaj terenoj, kie eble nia ŝancoj estas ankoraŭ pli favoraj ol en nia

kontinento, rigidiĝanta en lingva ĥaoso.

Cetere la Komitato aklame akceptis inviton al la hungara Balatonfűrdő por la 34-a IFEF-Kongreso en 1982. Provizoraj venontaj planoj: 1983 Belgio, 1984 Burgas (Bulgario), 1985 Sarajevo (Jugoslavio). Tamen almenaŭ tio esperigas, ke IFEF apenaŭ havas zorgojn pri kongreslokoj.

wbr

Auszüge aus Grußworten der Ehrengäste bei der Eröffnung des 33. IFEF-Kongresses in Regensburg

Dr. E. Schlessner,

Generalpräsident der FISAIC:

Es ist selbstverständlich, daß die Solidarität, die so vorbildlich die Eisenbahner aller Sparten, aller Dienstgrade und jeglicher Sprache dienstlich vereinigt, sich auch in der Freizeitgestaltung wiederfindet. Aber was dabei stört, ist eben diese Vielfalt der Sprachen, und es ist zu bedauern, daß man sich noch immer nicht auf Esperanto als einzige Sprache einigen konnte.

Dipl.-Ing. H. Weigelt,

Präsident der BD Nürnberg:

Es ist für mich, der ich häufig in Versammlungen Eisenbahner zu begrüßen habe, noch nicht dagewesen, daß ich 500 Mitarbeiter und Mitarbeiterinnen aus ganz Europa begrüßen darf. Und was dabei so wesentlich ist, daß ich Sie alle in einer Sprache anspreche, die Sie alle verstehen. Ich muß gestehen, daß diese Tatsache besonderen Eindruck macht ... Sie haben eine wichtige Aufgabe der heutigen Zeit erkannt, nämlich die zahllosen Spannungen zwischen den Menschen abbauen zu helfen. Sie tun das praktisch, indem Sie viele persönliche Kontakte knüpfen, Verbindungen über alle Grenzen, ohne daß das Hindernis „Sprache“ Sie aufhalten könnte. Sie reden nicht nur von Freundschaft, Sie praktizieren sie. Ich glaube, daß Sie auf dem richtigen Wege sind. Ihr Kongreß zeigt das. Machen Sie so weiter! Lassen Sie sich nicht entmutigen.

F. Viehbacher,

Oberbürgermeister von Regensburg:

Ihr internationaler Kongreß fügt sich ausgezeichnet in die Reihe der Regensburger Tagungen ein. Sie haben internationale Verständigung zum Programm Ihres Verbandes gemacht. Es ist der Versuch, Sprachbarrieren abzubauen, die in der Regel das wesentlichste Hindernis im Umgang mit anderen Völkern darstellen. Daß Sie sich entschlossen haben, Esperanto zu lernen und anzuwenden, ist ein Beweis dafür, daß Sie es mit dem Gedanken der internationalen Verständigung ernst meinen.

Abt. Präs. F. Knop,

Bundesbahn-Sozialwerk, Hauptvorstand: Immer wieder haben Eroberer versucht, mit Gewalt eine Sprache als allgemeinverbindlich durchzusetzen: Die ihre. Doch das mögen wir nicht so gerne. Freundlicher, friedlicher, freilich auch langsamer, versuchen die Esperantisten das gleiche Ziel mit Überzeugung zu erreichen. Wer wie ich auf Ihren Kongressen feststellen konnte, welche engen Beziehungen und Freundschaften zwischen Ihnen in aller Welt bestehen, kann darob nur seine große Freude zum Ausdruck bringen.

BOR A. Summer,

Vorsitzender des BSW-Bezirksvorstands Nürnberg: Das Ziel der Esperantisten, daß einmal jeder Mensch neben seiner Muttersprache auch Esperanto beherrscht und so überall verstanden wird, ist noch fern,

aber es zu erreichen, ist sicher des Schweißes der Edlen wert.

Es heißt: „Sitten und Sprachen trennen die Völker, Schienen und Straßen verbinden sie.“ — Ich glaube, in Ihrem Sinne und im Geiste Dr. Ludwig Zamenhofs zu sprechen, wenn ich diese Aussage so formuliere: „Sitten und nationale Sprachen trennen die Völker, Schienen, Straßen und Esperanto verbinden Sie.“

E. Haar, Vorsitzender der GdED:
Das Medium Esperanto böte international die Möglichkeit, die Sorgen des jeweils anderen besser kennenzulernen und gemeinsam auf Abhilfe zu sinnen ... Viele Millionen Menschen in unseren Ländern lernen Fremdsprachen, aber nur sehr wenige können sich später in einer dieser Sprachen wirklich verständigen. Englisch ist wahrscheinlich die auf der Welt am weitesten verbreitete Sprache. Da sie aber als Vermächtnis der Kolonialzeit für sehr viele eine Diskriminierung darstellt, sollten wir uns nach einer Sprache umsehen, die keine Nation bevorzugt oder benachteiligt. Dafür bietet sich Esperanto in geradezu idealer Weise an ... Noch fehlt der Esperanto-Bewegung

Trajno sen radoj

Naskiĝo kaj maturiĝo de la magnetglita tekniko en la Federacia Respubliko Germanio

Resumo de prelego originale verkita en Esperanto de Gernot Ritterspach, Komerca Direkcio de la DB

La fervojoj celas pli kaj pli rapidiĝi, jam dekomence. Nun oni priesploras la rapidecolimojn de la sistemo „rado sur relo“. Samtempe sciencistoj kaj inĝenieroj sin turnas ankaŭ al aliaj teknikoj, ĉar radoj ne estas la sola movrimedo por veturilo. Grandaj flugŝipoj ekzemple glitas sur aerkusenoj transmaren, pri aerkusenaj trajnoj eksperimentis la fervojoj britaj, francaj, italaj kaj usona industrientrepreno, sed sen epokfara sukceso.

die gesellschaftliche Akzeptanz. Noch ist sie nicht selbstverständlich geworden. Trotzdem müssen wir mit Optimismus und Ausdauer den beschrittenen Weg weitergehen, wie ihn der Schöpfer dieser Sprache zeitlebens unbeirrbar gegangen ist.

L. Betzmeir, bish. Vorsitzender der GDBA:
Meine Hochachtung gilt den Eisenbahnern, die sich der Mühe unterziehen, Esperanto, die Sprache der Hoffnung zu erlernen.

A. Zehnder, Vorsitzender der GDL:
Der 33. IFEF-Kongreß ist mir ein willkommener Anlaß, Ihnen meinen Dank zu übermitteln für Ihren nimmermüden Einsatz, der Weltsprache Esperanto zum Durchbruch zu verhelfen. Die Deutschen Eisenbahner-Esperantisten haben sich nunmehr seit über 70 Jahren diesem edlen Ziel verschrieben ... Als besonders dankbar haben wir es als Lokomotivführer empfunden, als die Eisenbahner-Esperantisten vor einigen Jahren weltweit Ermittlungen anstellten über die Arbeits- und Dienstverhältnisse der Lokomotivführer. Hier zeigt sich, welch wertvolle Informationsquelle diese Sprache sein kann und welch großartige Vermittlerrolle die Esperantisten zu spielen in der Lage sind.

Zug ohne Räder

Entstehung und Entwicklung der Magnetschwebetechnik in der Bundesrepublik Deutschland

Deutsches Resümee eines Vortrages von G. Ritterspach, Zentrale Verkaufsleitung der DB; Original: Esperanto.

Die Eisenbahnen waren von Anfang an bemüht, immer schneller zu werden. Jetzt ist man dabei, die Geschwindigkeitsgrenzen des Rad/Schiene-Systems auszuloten. Gleichzeitig wenden sich Wissenschaftler und Ingenieure auch anderen Techniken zu, denn Räder sind nicht das einzige, worauf man ein Fahrzeug bewegen kann. Beispielsweise gleiten große Luftkissenboote über die Meere, und mit Luftkissenzügen haben die britischen, französischen und italienischen Eisenbahnen sowie ein Unternehmen in den USA experimentiert, jedoch ohne durchschlagenden Erfolg.

La ebleco de magnetaj ŝvebigo estas priskribita en Germanio jam en 1935. Konataj estas tri diversaj sistemoj:

- 1) la permanentmagnetaj ŝvebigo, kiu montriĝis taŭga nur por malgrandaj veturiloj de internurba trafiko;
- 2) la elektrodinamika ŝvebigo, kiu baziĝas sur la forpuŝaj magnetfortoj estiĝantaj inter la enveturilaj magnetoj movataj (kun minimume 60 km/h) super metalaj reloj;
- 3) la elektromagnetaj ŝvebigo, ĉe kiu la enveturilaj magnetoj altire levas la veturilon preskaŭ ĝis ektaŭso al la veturvojo — restas nur 10-milimetra breĉo far elektronika reguligo de la magnetfortoj.

Kiel trakcia rimedo netuŝanta la veturvojon teorie eblas aerhelico, turbinreaktoro aŭ raketo, sed plej konvena kaj senproblema montriĝis la „linia elektromotora“. Ĝia statoro kun la elektromagnetaj volvaĵoj povas esti lokita en la veturilo, metalreloj en la veturvojo tiam servas kiel reaga parto; tiukaze oni parolas pri „kurtstatora“ linia motoro. Sed eblas ankaŭ, ke la statoro estas instalita laŭlonge de la tuta veturvojo, kaj la veturilo mem servas kiel reaga parto — jen la „longstatora“ linia motoro. En Germanio oni priesploris ĉiuj variantojn inter la du ŝvebigaj kaj la du trakciaj sistemoj.

De 1969 ĝis 1979 dek diversaj esplorveturiloj estas konstruitaj en Germanio, komence de kvar entrepren-grupoj sendepende laborintaj, de 1977 en komuna esplorado: Transrapid 01 ĝis 05, EET 01 kaj 02, Komet kaj HMB 2. — Ankaŭ en Japanio, Usono, Sovet-Unio, Francio kaj Kanado oni sin okupas pri liniaj motoroj kaj magnetglitaj veturiloj.

Dum la Internacia Trafik-Ekspozicio en Hamburgo 1979 funkciis unuafoje magnettrajno por la ĝenerala publiko: Transrapid 05, inaŭgurita de la Federacia Prezidento Scheel. Sistemo: elektromagnetaj ŝvebigo kun longstatora linia motoro. Sur 900 m longa veturvojo ĝi glitis je 90 km/h, ĉiam plene okupita. — Nun oni preparas en la Ems-rivera regiono testvojon 31,5 km longan, sur 5 m altaj

Die Möglichkeit magnetischen Schwebens wurde in Deutschland schon 1935 beschrieben. Drei verschiedene Systeme sind bekannt: 1) das permanent-magnetische Schweben, das sich nur für kleinere innerstädtische Verkehrsmittel als geeignet erwiesen hat; 2) das elektrodynamische Schweben, das auf den abstoßenden Magnetkräften beruht, die zwischen den Bordmagneten eines bewegten Fahrzeuges (bei mindestens 60 km/h) und den Metallschienen im Fahrweg entstehen; 3) das elektromagnetische Schweben, bei dem die Bordmagnete das Fahrzeug hebend an den Fahrweg heranziehen, beinahe bis zum Berühren — es bleibt nur ein Spalt von 10 mm dank elektronischer Regel- und Steuertechnik.

Als berührungsfreies Antriebsmittel kommen theoretisch die Luftschraube, die Turbine oder die Rakete in Betracht, als optimal und unproblematisch erwies sich jedoch der „Linearmotor“. Sein Stator mit der Magnetfeldwicklung kann im Fahrzeug angeordnet werden, Metallschienen im Fahrweg dienen dann als Reaktionsteil, man spricht vom sogenannten „Kurzstator-Linearmotor“. Der Stator kann aber auch entlang des ganzen Fahrwegs installiert sein, dann dient das Fahrzeug selbst als Reaktionsteil, man spricht vom „Langstator-Linearmotor“. In Deutschland wurden alle Varianten zwischen den beiden Schwebetechniken und den beiden Antriebsarten erforscht.

Von 1969 bis 1979 wurden zehn verschiedene Versuchsfahrzeuge konstruiert, anfangs von vier unabhängig von einander arbeitenden Firmengruppen, seit 1977 in gemeinsamer Forschungsarbeit aller Beteiligten: Transrapid 01 bis 05, EET 01 und 02, Komet und HMB 2. — Auch in Japan, USA, Sowjetunion, Frankreich und Kanada befaßt man sich mit der Entwicklung von Linearmotoren und Magnetschwebefahrzeugen.

Während der Internationalen Verkehrsausstellung in Hamburg 1979 verkehrte erstmals eine Magnetbahn für das allgemeine Publikum: die Transrapid 05, eingeweiht von Bundespräsident Scheel. System: elektromagnetisches Schweben, mit Langstator-Linearmotor. Auf der 900 m langen Strecke fuhr die Bahn mit 90 km/h, jedesmal voll besetzt. Derzeit wird im Emsland eine Versuchsanlage mit

fostoj, kie veturos en 1982 Transrapid 06 kun rapideco de 400 km/h. La energi-transmisio dum la veturo okazos sentuŝe per linia generatoro. — Post nelonge la magnetglita tekniko estos matura. Ĉu ĝi povos fermi la breĉon inter konvencijaj trajnoj kaj aviadiloj?

31,5 km aufgeständertem Fahrweg (5 m hoch) errichtet, wo 1982 die Transrapid 06 mit 400 km/h erprobt werden soll. Für berührungsfreie Energieübertragung während der Fahrt wird ein Linear-Generator sorgen. — Das System Magnetbahn wird schon bald ganz ausgereift sein. Wird es die Lücke zwischen konventioneller Eisenbahn und Flugzeug schließen können?

● **Achtung! Wir bieten an:**

**2 Kassetten
der Regensburger Konzerte**

2 hochwertige Kassetten zu je 90 Minuten Spieldauer mit dem Konzert

„De l' mezepoko ĝis nuntempo“,
aufgeführt in der Kirche
St. Emmeram am 16. 5. 1981 und

„Regensburga Bukedo“,
aufgeführt am 17. 5. 1981
im Kolpinghaus.

Preis für eine Kassette einschl. Versandkosten 17,— DM, für beide zusammen 33,— DM. Bestellungen werden erbeten bis 30. 9. an das GEFA-Sekretariat, Joachim Schrapp, Schmittingheide 17d, 4400 Münster/Westf. oder als EDS an BAMtm a.D. Schrapp, Bundesbahnschule 4400 Münster/Westf. Bitte gleichzeitig den Betrag auf das Konto 401 781 bei Sparda-Bank Münster, BLZ 400 605 60 überweisen unter Angabe, wofür er bestimmt ist. Die Kassetten sind auch bestens als Geschenk geeignet.

El la grupoj

Essen

Wiederum können wir 2 neue Mitglieder in unseren Reihen begrüßen: Dora Fehmel, 4100 Duisburg 18 und Bernd Kleinhenz, 5240 Betzdorf/Sieg (Bf Siegen). Wir gratulieren unserem Kollegen Retzlaff für seine andauernden Werbeerfolge.

Frankfurt/Main:

Bericht aus dem Bezirk Frankfurt — Informationsaktivitäten

Durch Kontakte zweier in Kassel durchgeführter Jahresversammlungen der BSW- Esperanto-Gruppen unseres Bezirks mit Beteiligung u. a. der GDBA erhielt nun der Bba für Esperanto eine Einladung zur diesjährigen Jahresversammlung der GDBA-Ortsgruppe Kassel am 2. 4. 1981 in Kassel.

Im Namen der BSW-Esperanto-Gruppen

begrüßte Egon Kiefer die zahlreich versammelten Mitglieder der GDBA in Esperanto und hatte im Rahmen der Begrüßung die Möglichkeit, eine Kurzinformation über die Internationale Sprache zu geben, sowie die Informationsprospekte von GEFA zu verteilen.

Die Information fand aufgeschlossene Zuhörer und ein positives Echo.

Man sollte m. E. gerade solche persönlichen Informationsmöglichkeiten vor einem größeren Kreis häufiger anstreben.

Ebenso ergab sich durch die Teilnahme eines Vertreters der GdED-Hauptverwaltung bei der letzten Jahresversammlung unseres Bezirks in Kassel die Möglichkeit, Informationen über Esperanto in die Presseorgane der GdED-Jugend zu bringen. Weiterhin wurde sowohl von der GdED-Jugendabteilung, Herrn Peter, als auch vom GEFA-Vorsitzenden Joachim Gießner und dem Bba Ffm die beider-

seitige Bereitschaft zu weiterer informativer Zusammenarbeit erklärt.

Für den Herbst 1981 ist eine Information der Bundesjugendleitung der GdED geplant. Kiefer

75 JAROJ ESPERANTO - GRUPO



Bremen

Nordgermana Esperanto
Tago 3.-4. Okt. 1981

Bremen valoras vojaĝon — okaze de la **Nordgermana Esperanto-Tago**, la 3/4an de Oktobro 1981 kun **fervojista renkontiĝo**.

Aŭtuna kunesto okaze de la 75a jubileo de la Bremena Esperanto-Grupo
Ni kunvenos kiel 1978 en la historia gastejo **„Zum Kuhhirten“**

Nia programo estas varia kaj interesa:

- ▶ Informvespero
- ▶ Urbesplorado
- ▶ Urbrondveturado
- ▶ Fervojista renkontiĝo
- ▶ Junulara kunveno
- ▶ Festprelego kaj danco

Ni ofertas specialajn nordgermanajn manĝaĵojn je vere modestaj prezoj.
Kotizoj: DM 15,— / 10,—, junuloj 5,—
Atiĝilon kaj informojn kun prospekto sendas volonte

LBi Hartig, BW Bremen Hbf
H. Dieter Hartig, Kasseler Straße 76,
2800 Bremen 1, Tel.: 04 21 / 35 33 39

Sprachprüfung für Jedermann
in Bremen, beim

Norddeutschen Esperanto-Tag
am 3./4. Oktober 1981

Jeder kann den ersten Schritt machen mit einem „Kursfina Ekzameno“!

Schon jetzt geben wir Ihnen die Bedingungen bekannt:

Alle Prüfungstexte werden dem **GEFA-Lehrbuch**

„ESPERANTO — eine lebendige Sprache“ entnommen — nur bis zum 4. Lernschritt! (Die 2. Auflage erschien in Regensburg!)
Nach bestandem Examen wird Ihnen ein Diplom überreicht.

— Gönnen Sie sich den Erfolg!
Die Bedingungen sind bekannt; es kann nichts schief gehen!
Anmeldungen an:

LBi Hartig, BW Bremen Hbf
H. Dieter Hartig, Kasseler Straße 76,
2800 Bremen 1

Nürnberg

Post la kursfino de la grupo Lichtenfels nia amiko Hans Müller daŭrigos la kunvenojn ĉiun 1an mardon de la monato en la instruadĉambro de la stacidomo kaj la 3an mardon de ĉiu monato en la gastejo „Wallachei“ (ambaŭ en Lichtenfels) kiel grupvespero. Li invitas komencantojn kaj progresintojn kiel eble plej ofte partopreni. La pasinta kurso estis tute sukcesplena. 12 komencantoj partoprenis ek de la komenco ĝis la fino (vidu ankaŭ Bultenon 1/81). GEFA gratulas kaj dankas pro la iniciativo kaj la daŭranta sukceso.

München

Bonvolu korekti la adreson de la Bba Josef Weidacher:
„Fka / Gega 800 München Ost,
Betreuungsstelle“.

Wichtig für unsere Senioren

Nachdem das letzte GEFA-Treffen in Oberkirch und der 33. IFEF-Kongreß in Regensburg stattgefunden haben, soll das Seniorentreffen für den nördlichen Bereich am **5. September 1981 in Münster/Westf.** stattfinden.

Eine besondere Einladung erfolgt rechtzeitig. Ich bitte Sie jedoch schon heute, diesen Termin vorzumerken.

E. Kruse

**Redaktfino por n-ro 4/81 estas
la 20an de Aŭgusto 1981**

Herausgeber / eldonanto: Hauptvorstand des Bundesbahn-Sozialwerks, Frankfurt (Main). Schriftleitung / redakcio: Wilhelm Graß, 8620 Lichtenfels, Sachsenstr. 7. Druck / preso: Druckerei Friedrichs, 3420 Herzberg am Harz